

NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)

Redaktas:

Jesús Miguel García Iturrioz



Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com


TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

En Fejsbuko, serĉu “esperanto grupo bilbao”

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Junaĝis 30 jaroj): 20 €.
KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550

OKTOBRO/DECEMBRO 2021

Nro. 129 (4/21)



Ni planis kunveni denove la sabaton 18an de decembro por kunmemori la tradician Z-tagon. Malgraŭ ke nuntempe la situacio rilate pandemion estas sufiĉe bona en nia regiono, post konstati ĝian evoluadon en aliaj landoj de Eŭropo kaj en Hispanujo mem, ni decidis, unu jaron plian, rezigni pri la kunveno kaj atendi pli konvenajn momentojn.

LOKE ...

KRISTNASKA LOTERIO.



Ni daŭrigas la disvendadon de la tradicia kristnaska loterio. La ĉi-jara numero estas **33.274**.

Ĉiu bileto kostas 5 €, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

La lasta tago por aĉeti la biletojn estos la vendredo 10a de decembro. Kaj oni rezervas biletojn al neniu.

Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao.
IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al esperantobi@gmail.com informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la skanitajn biletojn per repŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankkonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li aŭ ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al esperantobi@gmail.com kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet. Último día para comprar: viernes 10 de diciembre. No se reserva.

Para ello:



1. Hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**. **Cada billete cuesta 5 €**, de los que se juegan 4 €, quedando 1 € como donativo para el Grupo.

2. Hay que enviar un e-mail a esperantobi@gmail.com dando cuenta del ingreso.

3. Enviaremos los billetes, escaneados, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.
4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.
5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a esperantobi@gmail.com y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

Kunveno de eŭskaj esperantistoj.



La 24an de oktobro kunvenis en Vitoria-Gasteiz eŭskaj esperantistoj. Entute, 17 homoj, plejparte membroj de la E-Grupo de Bilbao, el kiuj multaj gelnantoj de la lastaj kursoj. Jen sur la foto la tuta rondo, krom la fotinto.

Unua vico (surgenuo): Ibai Redondo, Dominik (Germanio), Roberto Garrido, Paco López, Xabier Rico kaj Octavio Gutiérrez.

Dua vico (stare): David Redondo, Edorta Moreno, Rafa Blanco, Nicolás Xil, Natxo Apaolaza, Miren Elicege, Deborah (Kimrujo), Igone Manciles kaj Porru.

Kaj la fotinto estis Jon Alaña.

CUOTAS DEL AÑO 2021.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una "X", es que **te has olvidado de hacer el pago de la cuota de socio de este año.** El número de cuenta donde hacer el ingreso, así como las cuotas vigentes, están en la primera página de este "Nia Ponto".

Se maldekstre de tiuj ĉi alineoj ni metis "X", tio signifas, ke **vi forgesis pagivan kotizon por la nuna jaro.** Kontonumeron, kien enkontigi la monon, kaj nunajn kotizojn vi trovos sur la frontopaĝo de tiu ĉi "Nia Ponto".

Reta renkontiĝo de ĝemelaj urboj.



Partoprenis 8 homoj, nome: Barbara, Bernardo, Bruno, Joël, Konrad, Laure, Manfred kaj Pako, el la jam menciitaj urboj.

Kvankam principe Konrad devis gvidi la kunvenon, fine ĝi estis gvidata de Manfred pro teknikaj malfacilaĵoj de Konrad. Celo estis kontakti esperantistojn el aliaj urboj. Tiel ni interŝanĝis spertojn pri la maniero altiri homojn al la esperanta movado.

Post unu horo kaj duono de interparolado, ni konsentis pri rea okazigo de la kunveno en sekvanta monato (eble la 27an de novembro).

(Raportis: Pako, prezidanto de la E-Grupo de Bilbao)



Babilrondoj ĉiuvendrede.

ESPERANTO UNIVERSA LINGVO

BABILRONDOJ

Paroliga kurso

Ĉiuvendrede 19:30h - 21h

Oktobro 2021- Marto 2022

Por progresantoj kaj komencintoj.
Ankaŭ veteranoj estas bonvenaj.

Barrenkale barrena 7 - 1^a dcha
ESPERANTO-GRUPO DE BILBAO

Ĉiuvendrede, je la sepa kaj duono (19:30h-21h) ekde la pasinta oktobro, ni okazigas paroligan kurson en nia sidejo. Temas pri gvidata babilrondo. Oni parolas laŭvice por ke ĉiu homo parolu pli malpli dum la sama tempo. Ni parolas ankaŭ per ludoj kaj teatrumado.

En principo, estas clases de conversación guiadas durarán hasta el próximo mes de marzo cuando empezaría un nuevo curso básico. La asistencia a las "babilrondoj" es libre. Están especialmente enfocadas a alumnos de cursos pasados y a otros que han estudiado el idioma universal por su cuenta y que ahora desean soltarse a hablar o hacerlo de manera mas fluida. Veteranos esperantistas son también bienvenidos.

Besterik gabe eta ekimen honetan parte hartuko duzulakoan adeitasunez agurtzen zaituztet. *(Rap.: David. Desegnigis: Ibai)*

LOKE ...



Partoprenantoj en la babilrondo de la 12a de novembro. De maldekstre dekstren: Jon, Alberto, Igone, Edorta, Alberto, Ibai kaj David, la gvidanto.



Esperantistoj de la E-Grupo de Tubingo (Germanio) kun kiuj ni havas, de antaŭ nelonge apartan rilaton. De maldekstre dekstren, sur la foto, Charlie, Konrad kaj Manfred. Konrad loĝis en Bilbao dum kelkaj jaroj pro laboro kaj nun donas impulson al la ideo "ĝemelaj urboj" pere de la E-grupoj de Strasburgo, Tubingo kaj Bilbao.

Du belegaj kantoj.

Jen du belegaj kantoj, kiujn vi povas aŭskulti kaj spekti en la reto:



Miguel Fernández kantas “kuras vi, Amanda” – “Te recuerdo Amanda”, en la hispana famega originalo-. Kanto de la ĉiliana kantisto Víctor Jara (pr. Biktór Ĥára), kripligita kaj murdita 5 tagojn post la puĉo kontraŭ Salvador Allende (pr. Salbadór Ajénde).

<https://www.youtube.com/watch?v=K9AiZmzDJME>

María Ávila kantas “Ekas la nokto”. La kantoteksto ricevis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA 2021

https://www.youtube.com/watch?v=i50mqj_xyRY



KIAL NE ALIĜI AL HEF?



Hispana Esperanto-Federacio malfermis jam sian novan kampanjon de aliĝo al la asocio por la jaro 2022.

Oni povas trovi la retan aliĝilon ĉe: <http://www.esperanto.es/inscripcion>.

Memoru ke nia asocio estas neprofitcela kaj nur kalkulas je la kotizoj de siaj anoj por antaŭenigi la disvastigon de Esperanto. Krome, pro la deklaro de "publika utileco", la kotizoj kaj aliaj donacoj al la Federacio ĝuas altajn fiskajn avantaĝojn. Skribu al admin@esperanto.es se vi deziras koni la detalojn. Ni atendas ĉiujn!

(Hispana Esperanto-Federacio. <http://www.esperanto.es/>)


Recordamos que la cuota anual de socio de HEF es de sólo 32 euros (30 si se decide recibir “Boletín” en formato digital), con descuentos para los jóvenes de menos de 30 años. Inscripciones a través de la red en <http://www.esperanto.es/inscripcion>

Por otra parte, al ser una asociación de utilidad pública, al hacer la declaración de la renta (**IRPF**), en Bizkaia, se tiene derecho a una **deducción del 30%** de la cuota de socio. Dicha deducción aparecerá directamente en la declaración.

LA “Grupo ESPERANTISTA de Bilbao” DEZIRAS AL VI ĈIUJ SUKCESAN KAJ FRUKTODONAN JARON 2022an.

Omaĝo al Federico García Lorca.

La jaro 2021 estas la 50a datreveno de la traduko al Esperanto de la "Cigana romancaro", la plej konata verko de la granda poeto Federico García Lorca, kaj la 85a datreveno de lia murdo en la komenco de la hispana intercivitana milito.



Ĉi okaze, Hispana Esperanto-Federacio organizis omaĝon al tiu ĉi universala andaluzo.

Federico García Lorca (1898-1936) estis genia poeto kaj dramaturgo, verva pianisto, pentrartisto kaj prelegisto: kion ajn li tuŝis, tion li transformis en eternan belartaĵon. Aldone li posedis tian magnetan simpation, ke ĉiuj, kiuj lin traktis, tuj kaptiĝis de lia ĉarmo, lia talento kaj lia inspiro. Krom *Cigana romancaro* li verkis interalie *Libro de poemoj* (1921), *Kanzonoj* (1927), *Poeto en Novjorko* (1935). El lia dramaturgio menciindas *La domo de Bernarda Alba*, *Sanga nupto*, *Sterila*. La tempopaso nur kontribuis tutmondan gigantigon de lia figuro.

La omaĝo konsistas el duobla eldonado. Unue, ni reeldonis tiun *Ciganan romancaron* en bita formato. La nova eldono estas elŝutebla tute libere kaj senpage el Bitoteko en pluraj bitaj formatoj. Temas pri la dua bitlibro en la kolekto "Hispana literaturo" eldonita de la Federacio, post la antaŭa bitigo de la traduko al Esperanto de Don Quijote, de Miguel de Cervantes. La nova eldono estas tute fidela al la origina traduko, pri kiu respondecis la plej grava tradukisto de hispanlingvaj verkoj al Esperanto, Fernando de Diego. Ĝi enhavas krome novan Antaŭparolon, kun analizo de la traduko, redaktitan de Antonio Valén. Estis produktita ankaŭ memorkarto kun la tekstoj, por tiuj dezirantaj havi ĝin fizike, aŭ kiel memoraĵon aŭ donacon.



La duan elementon de la omaĝo konsistigas publikigo de antologio de poemoj de García Lorca tradukitaj de la esperantista poeto Miguel Fernández, kun titolo "*Omaĝo al Lorca*". La libro, 300-paĝa, enhavas ankaŭ serion de eseoj kaj komentarioj pri Lorca kaj lia verko, redaktitaj ankaŭ de Miguel Fernández, speciale pretigitaj por internacia legantaro. La enkonduko de tiu ĉi libro estis verkita de Duncan Charters, fakulo pri hispana kulturo kaj nuna prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

(Oktobro 2021. Prenita el la TTT-ejo de HEF)

(Noto: Nia E-Grupo akiris kelkajn ekzemplerojn de ambaŭ verkoj, kiujn vi povas aĉeti tre favore preze en nia sidejo).

Esperanto en kosmoŝipo.

Oni anoncis la baldaŭan spacvojaĝon de la naudek-jara, kanada aktoro William Shatner, kiu aktoris en la esperantlingva filmo "Incubus". Li rolis ankaŭ kiel kapitano Kirk en la serio "Star Trek". Do verŝajne tiu estos la ĝisnuna plej viva ĉeesto de Esperanto ekster nia planedo.

Pri la aktoro: https://eo.wikipedia.org/wiki/William_Shatner

Pri la filmo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Incubus>

<https://www.youtube.com/watch?v=ZjkPNTruHtC>

(Albert Reyna. 13/10/2021)

TEJO en speciala konsulta rilato kun UN.

La Komitato pri Ne-Registaraj Organizoj (NRO) en sia Regulara Kunveno de 2021, laŭ kunsidoj okazintaj inter la 17-a kaj 27-a de majo kaj en la 7-a de junio 2021, decidis rekomendi al la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de Unuiĝintaj Nacioj (UN) Specialan Konsultan Statuson por Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), la junulara sekcio de UEA.

La rekomendo estis finaprobata de EKOSOK en kunsido okazinta inter la 21-a kaj 22-a de julio 2021 kaj oficiale informita al TEJO en septembro. La statuso formaligas la rilatojn de NRO-oj kun UN kaj ebligas al ili rekte reprezentiĝi ĉe eventoj kaj kunsidoj de UN al kiuj NRO-oj estas invititaj. Ĝis tiam TEJO kaj junaj esperantistoj povis tion atingi nur pere de UEA.

La rilatoj de UEA kun la UN-sistemo havas longan historion. Jam en 1954 UEA ricevis konsultajn rilatojn kun Unesko, kiuj tiutempe aŭtomate rajtigis la organizojn formale rilati ankaŭ kun UN. Poste, en la 1970-aj jaroj, UEA ricevis la statuson por apartaj konsultaj rilatoj ankaŭ kun UN. Finfine, en 1998, EKOSOK ŝanĝis sian sistemon de konsultaj rilatoj kaj reasignis tiujn rilatojn al UEA. Pro tio la jaro 1998 troviĝas apud la nomo de UEA en la listo de NRO-oj en konsulta statuso kun EKOSOK, sed la rilatoj de UEA kun UN kaj Unesko havas pli longan historion. Detalojn pri la periodo ĝis 1974 oni povas legi en la libro *Esperanto en Perspektivo* (1974), de Ivo Lapenna, kaj en diversaj numeroj de la serio *Esperanto-dokumentoj*, kiun UEA eldonis en la periodo post 1974.

Nun ankaŭ TEJO estas reprezentata memstare kaj kune kun UEA reprezentas Esperanton kaj la esperantistaron ĉe UN. Konkrete tio faciligos la aliron de TEJO al UN-eventoj kaj -kunsidoj, al kiuj NRO-oj estas invitataj, kaj la defendon de la starpunktoj de TEJO kaj de la esperanta junularo. Post UEA kaj Esperanto Radikala Asocio (ERA) ĝi estas la tria Esperanto-organizaĵo kun tiu statuso.

UEA gratulas al TEJO pro la grava kaj laŭdinda atingo, kiu spegulas longdaŭran laboron de la lastatempaj estraroj kaj pluraj Esperanto-aktivuloj ĉe la UN-sistemo, inter ili Michael Boris Mandiroła, Veronika Poór, Sara Spanò, Fernando Maia, Francesco Maurelli kaj Rakoen Maertens. La nuntempa Estraro de TEJO daŭrigas la laborojn, strukturante la agadon ĉe UN kaj trejnante novajn aktivulojn por agadi ene de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj, partnere kun UEA.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 988. 14/10/2021)